


BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



Praha-ek-1955-21-01

AL ĈIUJ NIAJ MEMBROJ, AMIKOJ KAJ SUBTENANTOJ

NI DEZIRAS PLEJ SUKCESAN NOVAN JARON 1955!

Dro Josef Barviš atingis en novembro 75 jarojn.

Li estas pioniro de la unua horo, esperantisto de post 1900. Li venis inter nin en Praha, kiam la Klubo kunvenadis en kafejo Tůmovka, en tiuj unuaj jaroj, plenaj da espero, fido kaj entuziasmo. Ni akceptis juriston, junulon, plenan de energio, aktivulon, studomulon, belulon ameman kaj amindan, amikon fidelan. Okulo esperanta. Koro brulanta. Intelekto pensanta. Menso progresema. Li fariĝis motoro de nia opozicia Bohema Societo Esperantista. Sekretario ĉiam preta kunlabori. Senlaca gvidanto de kursoj, liaj kursanoj tiam svarmis. Esperantlingvaj prospektoj de la ekspozicio en 1908 estis lia merito kaj akcepto de tiama karavano de pli ol du cent esperantistoj gvidata de Hodler precipe lia iniciato. Dum la u.kongreso li sukcesis aldonigi „Moravian Karton“ tre bone de li tradukitan. Li maturiĝis. Viro persista. Li maljuniĝis. Ĉiam fidela. Konsilisto de ĉs.fervojoj emerita en Brno estas regula vizitan de la Klubaj kunvenoj, aktiva partoprenanto en ticaj famaj programoj. Homo modesta. Neniu sciis pri lin 70-a naskiĝtago.

Li permesu do, ke lia kunulo en bataloj estintaj salutu lin ĉe tiu ĉi okazo.

Stan. Kamarýt

LA GLORA TRADICIO DE LA REVUO LITERATURA MONDO REVIVIĜOS.

Samideanoj Waringhlen kaj Fiquet el Francio intencas Elini altnivelan literaturan revue. Ĝi aperos ekde 1955 ĉiun duan monaton kaj alportos la plej bonajn neeldonitajn verkojn de Esperantaj aŭtoroj kaj krome ankaŭ facile legeblan parton, dediĉitan al artoj, science, metioj, kutima vivo ktp. Jen sciigo, kiu ĝojigos koron de ĉiu literaturananto. Ne nur por la renomaj, sed ankaŭ por la debutantaj aŭtoroj malfermiĝas inda tribuno. Kontribuaĵojn estas eble sendi pere de Tomáš Pumpr, Thälmannova 8, Praha-Bubeneč. Ni donos pluajn informojn tuj, kiam la plano realiĝos.

Pumpr

TAMMINEN MORTIS. Laŭ informo el meza novembro de Vilho Satälä el Helsinki mortis tie antaŭ kelkaj semajnoj f-ino Elmi Tamminen, nia fidela mikino, kiu kelkfoje vizitis nian landon. La malĝoja sciigo tuŝos profunde koron de ĉiuj, kiuj konis tiun ĉi bonan virinon!

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkáčh, 26. je la 20-a horo. Programoj por januaro 1955.

22.12.1954 Jar. Ŝustr: Kristnaskaj kutimoj en diversaj landoj.

29.12.1954 Jar. Mařík: Kion al ni donis la ĵus pasinta jaro.

5. 1.1955 E. Suchardová-A.Seemann: Písničkář – pásmo o básníku soboteckého kraje V. Šolci.

12. 1. Dolfa Bartošík: Eduko de difekto parolantaj infanoj en ĈSR.

19. 1. Jan Zemek: Flugantaj teleroj.

26. 1. Josef Vítek: Miaj kontaktoj kun francaj samideanoj (IIa parto)

2. 2. Jar. Ŝustr: Hodiaŭ denove io interesa...

9. 2. MUDr. Frant. Macholda: Mia plej granda amo (pri Pasteur-instituto en Parizo)

Dimanĉe la 26an de decembro 1954 je la 17 horo en kino Olympic prelegas nia membro Josef Vítek pri Laplando – kun filmo kaj lumbildoj. Ni rekomendas al vi venigi viajn konatulojn!

Kino Olympic, Spálená strato

HEROLDO DE ESPERANTO EN 1955. Tiun ĉi gravan garezon povis la ĉeĥoslovakaj esperantistoj legi preskaŭ en ĉiu loko de nia lando, kie estis konstatebla ia aktiveco. Tiel povis okazi danke al afableco de la eldonanto s-ro Teo Jung, kiu disponigis al ni de ĉiu numero senpage konsiderindan kvanton. Ni ne povas ankoraŭ diri, ĉu li povos agi simile ankaŭ dum la jaro venonta. Por la okazo de tiu ebleco ekzistos, ni notas ĉi tio kondiĉojn, laŭ kiuj ni liveros tiun revuon dum 1955.

En tiu okazo-kaj se la kvanto sufiĉos-ricevos la Heroldon dum 1955: 1) dumvivaj abonantoj, 2) personoj, por kiuj estis pagita la abono en eksterlando, 3) gravaj ĉeĥoslovakaj Esperanto-laborantoj, 4) lokoj kun aktivaj E-grupoj aŭ kun rimarkinda E-movado.

Sur adreslipo ni ruĝe substrekas la lokonomon ĉe samideanoj, kiuj ne bezonas al ni aparte skribi pri ricevado de Heroldo en 1955. Atentu tiun slipton!

El ĉiuj aliaj lokoj ni atendas informon pri fidinda persona adreso, kiun la samideanoj el tiu loko rekomendas. Tie estos je ilia dispono ĉiu numero de Heroldo. Ni ne sendas la revuon al adresoj de grupoj, uzinaj kluboj k.s., ĉar tro multe da taj sendaĵoj perdiĝas.

Kiam ni ricevos decidon de la eldonejo pri liverblo en 1955, ni sendos al personoj, al kiuj ni povos la revuon regule sendadi, nian pagilon kun indiko de sumo de niaj elspezoj. Nur post ricevo de tiu pago ni ekspedos la gazeton. La pagintoj konsciu, ke eventuala resto estos uzata por Esperanto-celoj. Ni esperas, ke ni ricevos tiun pagon ankaŭ de personoj, kies abono estis pagita en eksterlando.

Pagu sole tiuj, kiuj ricevos nian pagilon kun noto Heroldo 1955. Ni ne povas akcepti kontantan pagon! Evidu korespondadon en afero de Heroldo!

Ni atentigas denove, ke ne ekzistas la ebleco aboni la gazeton kaj restas honora devo de ĉiuj legantoj rekompenci la noblan geston de la eldonanto per tuja abono kaj intensa varbado de pluaj abonantoj, kiam niaj instancoj permesos al ni la abonon!

ĈU VI SCIAS KE LA PREPARA KOMITATO DE SOMERA KOLEGIO EN DOKSY JAM KOMENCIS SIAN
LABORON POR 1955?

ESPERANTO EN SVISA RADIO. Ĉiun mardon kaj Laudon je 11.55 h. kaj 17,35 h. aŭskultu la stacion
Bern 75,28 m, 48,66 m, 31,46 m, 19,60 m (marde Baur, ĵaŭde Privat) kaj konfirmu la aŭskulton al
Schweizer Kurzwellendienst, Postfach Transit, Bern. Per danko al la radiostacio vi subtenos la laboron
de niaj amikoj en Svisio.

Venonta numero apero komence de februaro. Koresponda adreso: Jar. Šustr, Praha I., Dlouhá 10.